

Esperanto Verlag Möller & Boret

VOL. 2

AUGUST, 1907

NO. 1

A Journal of the International Language

AMERIKA ESPERANTISTO

(AMERICAN ESPERANTIST)

PER COPY, TEN CENTS
PER YEAR, ONE DOLLAR

700007-C  2
1907-8

1239 Michigan Avenue, Chicago, U. S. A.

700007-C 2
1907-8

FAKO DE KORESPONDADO

^a Oni deziras nur leterojn ; ^e nur poŝtkartojn ilustritajn.

UNUIGITAJ ŜTATOJ AMERIKAJ

JOHN H. GRAY, 280 17th Ave., San Francisco, Calif.
WM. STANTZ, 721 Folsom Street, San Francisco, Calif.
H. LAWS, "Walmond," Applegate, California
F. E. SMITH, 217 Eleventh St, Oakland, California
M. J. CALLAHAN, Brownell, California
CHAS. A. STEERE, Box 11, National City, California
A. R. LINDSTEDT, 1419 E. 17 St., Los Angeles, Cal.
HARRY D. BRYANT, Sheldon, California
KENNETH SMITH, 606 N. Nevada, Colorado Springs.
MAURICE I. FEINBERG, 719 31st St., Denver, Colo.
Sno. THOS. C. HATTON, Minneola, Florida.
J. C. FLYNN, 602 Austell Building, Atlanta, Georgia
ROBERT WELLS, 300 Kennesaw Ave., Marietta, Ga.
F. J. PETERS, Golden, Illinois
Sno. CLARA TODSON, 28 The Spurling, Elgin, Ill.
F. J. M^cKENNA, 6805 Prairie St., Chicago
^aS. R. OLMSTEAD, 5712 Erie St., Austin, Chicago
^aCHAS. E. HEDREY, 359 Jackson Boulevard, Chicago
BURLEIGH L. COOMBES, RFD. 28, Chesterfield, Ill.
WINIFRED SACKVILLE STONER, Evansville, Ind.
FLOYD HODSON, RFD. 10, New Castle, Indiana.
A. W. BEACH, Sheldon, Iowa
C. G. W. CLAUSEN, St. Ansgar, Iowa
GEO. H. FRACKER, Storm Lake, Iowa
N. A. PUDERBAUGH, 17 & Villas, Leavenworth, Kan.
^aWM. A. ROSELLE, Ft. Thos. Station, Newport, Ky.
C. H. BARROWS, Lamon, Louisiana
E. K. SCHULTZ, 1740 Park Ave, Baltimore, Md.
N. A. C. SMITH, 27 Downing St., Worcester, Mass.
F. M. MILLER, 70 West St., Pittsfield, Mass.
F. CUNNINGHAM, 909 Exchange Bldg, Boston, Mass.
Dro. E. J. THOMPSON, 17 Market St., Lynn, Mass.
^aHARRY E. FARRAR, Box 1516, Lee, Mass.
Fno. GEORGIA E. CLARKE, RFD. 3, Deford, Mich.
T. R. HOORN, 629 Railroad Ave., Fergus Falls, Minn.
^eE. J. M^cKINNEY, 405 Charles St., St. Paul, Minn.
W. S. JOHNSON, Tuscumbia, Missouri
J. BIANCHI, Columbia, Missouri
^eGLEN H. BROYLES, Bethany, Missouri
H. E. WILLIAMS, Newtown, Missouri
J. M. RECTOR, Monarch, Montana
WILLY BRACH, Smithfield, North Carolina
^eT. J. BRACKETT, RFD. 1-17, Greenland, N. H.
GEO. W. MARTIN, Box 34, Metuchen, New Jersey
ALFRED D. KARR, 822 DeGraw Ave., Newark, N. J.
^aA G. CRAIG, "La Hacienda," Alpine, New Jersey
HAROLD BUNKER, Merrick, New Jersey
JACOBSON HYMAN, 320 W. 26 St., New York City
WM. MITCHELL, 602 W. 146 St., New York City

(Al la 3^a de la kovrilo)

Amerika Esperantisto

Application pending for entry as Second Class Mail Matter

Monata Revuo de la Lingvo Internacia, Esperanto
Monthly Magazine of the International Language, Esperanto
1239 Michigan Avenue, Chicago

Jarabono, ĉie en la Mondo, Unu Dolaro (Frankoj 5.25)
Yearly Subscription, Anywhere on Earth, One Dollar

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO, ELDONANTOJ
AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, PUBLISHERS

Redaktoro : ARTHUR BAKER : *Editor*

Ĉiu manuskripto estas, se tiel petate, nepre resendata al la sendinto. La redakcio rifuzas nenion sekve de ĝia temo, aŭ politika aŭ alia; kaj senescepte retenas al si la rajton korekti manuskriptojn. Sendu verkon.

VOLUME 2

AUGUST, 1907

NUMBER 1

Gramatikemeco estas tre bona, sed propagandemeco estas pli bona. Kiu parolas faras bone, sed kiu agas faras multe pli bone.

Tre ofte oni skribas al la redakcio demandante pri la plej bona metodo lerni Esperanton. Estas unu respondo sola: Vi legu, parolu, kaj ĉiam legu kaj parolu. Ĉu vi ne tiel lernis vian patran lingvon?

La Nacia Asocio Edukada de la Unuigitaj Ŝtatoj forlasas sian penadon al reformo de la angla ortografio, post dek jaroj da senfrukta laboro. Ankoraŭ vivas tiuj kiuj opinias ke simpligita angla povas esti la lingvo internacia. Jen problemo: Se en dek jaroj oni faras nenion, kiom li faros en cent jaroj, sukcesante laŭ tia sama proporcio?

Neniam tute mankas kompatato en la naturo. Tial, dum la varmega nuna vetero, ni estu dankaj ĉar momente ĉesas la lacigantaj kontraŭesperantaj argumentoj de nia bona malamiko, Prof. Weimar, de Harvard. Prof. Munsterberg jam involvis sin en io kiam li pilgrimis al Boise por asisti ĉe la sanktuligo de Lia Plej Sankta Moŝto, Harry Orchard, kaj dum Sanktulo Harry sin okupas je sia aŭtobiografio kaj lia admiranta Hugo atentis la problemon "kiam devas psikologiisto fermi al si la buŝon?" Esperanto senĉese antaŭeniras.



LA SANKTEGA BUĈILO!

Estis tempo, kiam la sola okupo de la verkisto estis laŭdadi la farojn de sia sinjoro. La vero ricevis iom da respekto, aŭ ne, laŭ cirkonstancoj; sed se la laudaĉo mankis, mankis ankaŭ al la verkisto manĝo por la ventro, se ne kapo por la ŝultroj. Sed tiu tago ne revenas, spite la sopiroj de tiuj al kies nazoj nenio bonodoras escepte ke ĝi estu iom putra—speco de homa buzo aŭ buza homo. Tia literatura birdaĉo, en *Tra la Mondo*, prezentas la jenan ridindaĵon:

Unu markizo alvenas al tiu elekto kiu nepre sin prezentas al ĉiuj homoj—ĉu labori, ĉu ŝteli, ĉu malnutri. Malnutri certe ne plaĉas al li; kaj labori estas pli malagrabla ol morti. Restas nur ŝteladi aŭ rabadi. Sed, bedaŭrinde, en la metodo de rabado la hipoteko kaj profitkalkulo anstataŭigis la glavon. Ĉu iu franca nobelo povus tuŝi la kubuton de la *bourgeoisie*? Li devas foriri kaj komerci en malproksima insulo. Sed, antaŭ ol la ekvojaĝo, li lasis la sanktan glavon de siaj prapatroj kun iu gardisto, por ke ĝi ne rustu de honto. La nesanktaj markizino kaj markizidoj ne estas tiel gardindaj, kaj akompanis lin al komerco—kaj honto!

Martinika nigrulo ne estas Jay Gould, kaj se franca nobelete povas trompegi amerikan fervojan prezidanton, ĉu ne avara markizo povas tiel marĉandi kontraŭ negroj ke eĉ la sanktaj buĉistaj prapatroj aplaŭdus?

Riĉiĝas la markizo. Desinfektante sian monon por forigi la komercan odoron, li kaŝis ĝin en sia pantolon kaj revenis Francujon. Dece alfumite, revenis ankaŭ la ino kaj idoj. "Se vi posedas larmojn, pretiĝu nun ilin elverŝi!" Diras la rakontanto:

. . . Li revenis hejmen por postuli sian glavon. . . . Malfeliĉo! por tiuj, kiujn tiaj scenoj ne kortuŝas! La Markizo, tenante per la mano sian respektindan edzinon, modeste aperis meze de la kunvenintaro. La plej profunda silento regis ĉe la tuta ĉeestantaro. La markizo komisiis sian edzinon al sia pli juna filo kaj al sia filino, antaŭeniras je ses paŝoj kaj petis sian glavon. . . . Ekvidinte iom da rustaĵo ĉe la pinto, li proksimigis ĝin al siaj okuloj, kaj ŝajnis al mi, ke larmo falis sur la rustitan lokon. La sekvo montris al mi ke mi ne eraris. "Mi trovos," diris li, "alian rimedon por ĝin purigi."

Kion do signifus la progresoj de civilizacio se ĉiu homo povus kunplori kun la markizo ĉe la treege grava okazo! Ploru? De tiaj aferoj ŝajnus ke diabla ridego skuus la tutan planedaron pro la aĉegan memtrompado de la homa raso.

KONSTITUCIO DE LA UNUIGITAJ ŜTATOJ

Tradukis G. W. Lee, ano de Bostona Societo Esperantista.

ARTIKOLO I

Leĝfaranta Departemento—Kongreso Ĝenerala

Fako 1

Ĉiuj leĝaj povoj per tiu ĉi donotaj devos esti donataj al unu Kongreso de Unuigitaj Ŝtatoj, kiu devos konsisti el Senato kaj Domo de Reprezentantoj.

Fako 2

La Domo de Reprezentantoj devos konsisti el anoj elektotaj, ĉiun duan jaron de la popolo de la apartaj ŝtatoj, kaj la elektantoj en ĉiu ŝtato devos havi la ecojn necesajn por elektantoj en la plej multenombra ĉambro de la ŝtata leĝfarantaro.

Neniu estos Reprezentanto, kiu ne jam estos atinginta aĝon dudek-kvin jaran, kaj ne jam estos sep jarojn regnanto de Unuigitaj Ŝtatoj, kaj, kiu ne estos, kiam elektate, loĝanto de tiu ŝtato en kiu li estos elektata.

Reprezentantoj kaj rektaj impostoj devos esti proporciigitaj inter la apartaj ŝtatoj kiuj eble estos enmetintaj sin en tiun ĉi Ligon, laŭ la nombro da iliaj propraj loĝantoj, kiun oni decidis per la aldono al la tuta nombro da liberuloj tiujn, kiuj estos devigitaj servi periodon da jaroj, kaj, escepte neimpostpagantajn indianojn, tri kvinonoj da aliaj personoj.

La efektiva kalkulado devos okazi antaŭ ol tri jaroj post la unua kunveno de la Kongreso de la Unuigitaj Ŝtatoj, kaj en ĉiu sekvanta dek jaroj laŭ tia maniero, kian ili per leĝo ordonos. La nombro da Reprezentantoj ne devas esti pli granda, ol po unu por ĉiu tridek mil, sed ĉiu ŝtato devos havi almenaŭ unu Reprezentanton, kaj ĝis tiu kalkulado estos finita, la ŝtato *New Hampshire* estos permesata tri, *Massachusetts* ok, *Rhode Island and Providence Plantations* unu, *Connecticut* kvin, *New York* ses, *New Jersey* kvar, *Pennsylvania* ok, *Delaware* unu, *Maryland* ses, *Virginia* dek, *North Carolina* kvin, *South Carolina* kvin, kaj *Georgia* tri.

Kiam malplenaĵoj okazos en la reprezentantaro de ia

ŝtato ajn, ĝia regantara aŭtoritatulo devas eldoni avizojn pri elekto por plenigi tiajn malplenaĵojn.

La Domo de Reprezentantoj devas elekti sian estron kaj aliajn oficistojn, kaj devas havi solan potencon por ilin eksigi.

Fako 3

La Senato de la Unuigitaj Ŝtatoj devas konsisti el du Senatanoj el ĉiu ŝtato elektotaj de la leĝfarantaro de tiu ĉi por ses jaroj; kaj Senatano devos havi unu voĉdonon. Post kiam ili kunveniĝos, sekve de la unua elekto, ili devos esti dividata tiel egale, kiel oni povas, en tri klasojn. La oficoj de Senatanoj de la unua klaso devas esti forlasataj je la templimo de la dua jaro, de dua klaso je la templimo de la kvara jaro, kaj de tria klaso je la templimo de la sesa jaro, tiel ke la triono povos esti elektata ĉiun duan jaron; kaj se mankoj en la nombro da anoj okazos per ekŝigo aŭ cetere, dum la libertempo de la leĝfarantaro de ia ŝtato, la regantaro de tiu ĉi povas fari provizorajn elektojn ĝis la sekvanta kunveno de la leĝfarantaro, kiu tiam devos plenigi tiajn mankojn.

Neniu devos esti Senatano kiu ne jam estos atinginta aĝon je tridek jaroj kaj ne jam estos naŭ jarojn regnando de la Unuigitaj Ŝtatoj, kaj kiu ne estos, kiam elektate, loĝanto de tiu ŝtato, pro kiu li estos elektata.

La vic-prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj devas esti prezidanto de la senato, sed devas havi nenan voĉdonon, escepte kiam la Senatanoj estos egale dividataj en ia voĉdonado.

La senato devas elekti siajn aliajn oficistojn kaj ankaŭ prezidanton provizoran, en la forestado de vic-prezidanto, aŭ kiam ajn tiu plenumas la oficon de prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj.

La Senato devas havi solan potencon alkonduki al juĝo ĉiujn denuncatojn. Kunsidante por tia celo, ili devas esti je ĵuro aŭ certigo. Kiam la prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj estos juĝata, la juĝistestro devas prezidi, kaj neniu devas esti kondamnata sen la konsento de du trionoj de la Senatanoj ĉeestantaj.

Juĝoj en procesoj de denunco ne devas esti pli granda ol forigo de ofico, kaj malkapabligo por teni kaj ĝui ian oficon ajn de honoro, konfido aŭ profito sub la Unuigitaj Ŝtatoj; sed persono kondamnita tamen devas respondi kaj esti

submetata al kulpigo, provo, juĝado kaj punado laŭ la leĝo.

Fako 4

La tempoj, lokoj kaj maniero teni elektojn por Senatanoj kaj Rezentantoj devas esti ordonataj en ĉiu ŝtato de la leĝfarantaro de tiu ĉi; sed la Kongreso povas iam per leĝdono fari aŭ aliigi tiajn regulojn, krom pri la lokoj elekti senatanojn.

La Kongreso devas kunveni almenaŭ unufoje ĉiun jaron, kaj tia kunveno devas esti la unuan lundon de Decembro, escepte ke ili per leĝo nomos alian tagon.

Fako 5

Ĉiu domo devas esti juĝanto de la elektoj, raportoj kaj ecoj de siaj anoj, kaj plimulto el ĉiuj devas esti kvorumo por agadi; sed pli malgranda nombro povas prokrasti de tago al tago, kaj povas esti permesita devigi la ĉeeston de la neĉeestantoj, tiel maniere, kaj sub tiel punoj, kiel ĉiu domo provizos.

Ĉiu domo povas decidi regulojn de siaj procedoj, puni siajn anojn por malordema konduto, kaj, kun konsento de du trionoj, elpeli anon.

Ĉiu domo devas subteni ĵurnalon pri siaj procedoj, kaj de tempo al tempo devas publikigi tiun ĉi, escepte tiuj porcioj, kiuj laŭ ilia juĝo postulas sekretecon; kaj la jesoj kaj la neoj de la anoj de ĉiu domo pri ia demando devas esti enskribata en la ĵurnalo, laŭ la deziro de unu kvinono de la ĉeestantoj.

Ĉiu domo dum la kongreso ne devas prokrasti pli ol tri tagojn sen la konsento de la alia nek al iu loko ol tiu en kiu la du domoj estas kunsidantaj.

Fako 6

La senatanoj kaj reprezentantoj devas ricevi kompensadon pro iliaj servoj, kiu devas esti certigata laŭ leĝo kaj elpagata el la kasejo de la Unuigitaj Ŝtatoj. Ili devas ĉiuokaze escepte perfido, krimado, kaj breĉo de la paco, esti nerespondaj je aresto dum sia ĉeesto ĉe la kunsido de siaj propraj domoj kaj irante kaj revenante de tiuj ĉi samaj; kaj pro ia parolado aŭ diskutado en ĉiu domo, ili ne devas esti demandata en alia ajn loko.

Neniu senatano nek reprezentanto devas, dum la tempo por kiu li estis elektata, esti nomata al ia civila ofico sub aŭtoritato de la Unuigitaj Ŝtatoj, kiu estos kreita, aŭ kies salajro estos plimultigita dum la sama tempo, kaj neniu

tenante ian oficon sub la Unuigitaj Ŝtatoj, estos ano de ĉiu domo dum sia daŭro en ofico.

Fako 7

Ĉiuj leĝmovoj por trovi enspezon devas deveniĝi en la domo de reprezentantoj; sed la senato povas proponi aŭ konsenti al reformadoj kiel pri aliaj leĝmovoj. Ĉiu leĝmovo kiu estos aprobita de la domo de reprezentantoj kaj la senato devas, antaŭ ol ĝi fariĝos leĝo, esti prezentata al la prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj; se li aprobas li ĝin devas surskribi, sed se ne li ĝin devas redoni, kun liaj kontraŭparoloj al tiu domo en kiu ĝi estos deveniĝinta, kiu devas enskribi kontraŭparolojn en tuteco en sian ĵurnalon, kaj devas procedi ĝin rekonsideri. Se post tiu rekonsiderado du trionoj de tiu domo konsentos aprobi la leĝmovon, ĝi devas esti prezentata, kune kun kontraŭparoloj, al alia domo de kiu ĝi simile devas esti konsiderata, kaj se ĝi estos aprobita de du trionoj el tiu domo ĝi devas fariĝi leĝo. Sed en ĉiuj tiaj okazoj voĉdonoj de du domoj devas esti decidataj per jeso kaj neoj, kaj nomoj de personoj kiuj voĉdonos pro aŭ kontraŭ la leĝmovo devas esti enskribataj en la ĵurnalo de ĉiu domo. Se ia leĝmovo ne estos redonata de prezidanto en dek tagoj (dimanĉoj esceptitaj) post ke ĝi estas prezentita al li, la sama devas esti leĝo, tiel maniere kiel se li ĝin estis surskribinta, escepte ke kongreso per sia prokrasto malhelpos ĝian resendon, en kiu okazo ĝi ne devas fariĝi leĝo.

Ĉiu instrukcio, decido aŭ voĉdono al kiu interkonsento de senato kaj domo de reprezentantoj estos necesa (escepte pri demando de prokrasto) devas esti prezentata al prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj; kaj antaŭ ol la sama fariĝos leĝo, devas esti aprobita de li, aŭ estinte malaprobita de li, ĝi devas esti repasata de du trionoj el senato kaj domo de reprezentantoj, laŭ reguloj kaj limoj kiuj estas ordonitaj pri leĝmovo.

(Daŭrigota)

Rimarko Redakcia.—Ne ridetu, gelegantoj, ĉar oni prezentas por la deletado de via esperantista apetito tiel sekan dokumenton kiel estas la fundamenta leĝaro de nia nacio! Antaŭ nelonge homa amaso punis ĝis preskaŭ la morto iun malsaĝulon kiu insultis al nia nacia standardo. Tio ja estas nur emblemo, sed jen la io mem, la kontrakto laŭ kiu kuniĝis tiuj dek tri strioj ruĝaj kaj blankaj, kaj tiu ĉiam kreskanta aro da steloj! Kia azenaro la popolamaso! Mortas en sia propra sango tiu kiu insultas la emblemon, dum ne unu el la perfidaj juĝistoj kiuj, malhonorigante la Konstitucion, kronis siajn nomojn per malhonoro, iam sentis aŭ la merititan ŝnuron de la oficiala ekzekutisto aŭ la koleran manon de la popolamason!

LA SAĜA SULTANO

El la germana tradukis Otto Voigt, el Dresden.

Al iu sultano de la turkoj, kiam li ĵus ekiris vendrede el la preĝejon, venis unu el liaj regatoj kun malorda barbo, disŝirita vesto kaj tratruigitaj pantofloj, faris la kutimajn honorsignojn antaŭ la imperiestro kaj diris: “Ĉu vi ankaŭ kredas, ĉiopova Sultano, kion instruas la sankta profeto?” La sultano, estante bona regnestro, reparolis: “Jes, mi kredas kion diras la profeto.”

La malriĉa homo daŭrigis siajn vortojn: “La profeto diras en la korano ke ĉiuj homoj estas gefratoj. Sro. frato, estu tiel bona kaj partigu kun mi la heredon.”

Ĉe tiuj vortoj la imperiestro ridetis, kaj pensis en si: Jen estas nova maniero petadi almozojn. Li donis al la homo monaĵon. La turko rigardadis ĝin longe, ambaŭflanke kaj pripensante. Fine li turnis la kapon kaj diris: “Sro. frato, kiamaniere mi ricevis ĉi-tiun monaĵon, dum vi posedas pli multe da arĝento ol povus porti cent muloj, kaj miaj infanoj en mia dometo palpiĝas pro malsato kaj mia buŝo baldaŭ ekkunekreskos pro sama kaŭzo; ĉu tio estas partigita kun frato?”

Tamen, la sultano levis sian fingron, admonante: Sro. frato, estu kontenta kaj diru neniel al iu kiom mi donis al vi, ĉar nia familio estas tre granda. Se ĉiuj el niaj gefratoj ankoraŭ venus, postulante iliajn heredaĵon de mi, tiam ĝi ne sufiĉus, kaj eĉ vi devus ankoraŭ redoni de via parto. Tion komprenis la petinto kaj kontentiĝis pri la ricevita.

Praktika Logiko.—*Vilaĝano* (al sia revenanta filo): Nu, kion, ĉion vi studis?

Studento: Logikon.

Vilaĝano: Mi ne scias, kion signifas tio.

Studento: Mi tuj klarigos ĝin al vi. Jen vi havas ĵus momente tri kolbasojn. Mi al vi pruvos, ke ili estas kvin kolbasoj: kie estas tri kolbasoj, tie do estas samtempe du, ĉu ne vere? Du kaj tri tamen estas kvin. Do vi havas kvin kolbasojn!

Vilaĝano: Hm! Nu, atentu! *Mi* nun manĝos la tri kolbasojn, kaj poste *vi* estos miaflanke permesata manĝi la du aliajn!

—Zacherl Carl, en *The British Esperantist*.

LA ESTONTECO DE LA SCIENCO

El Marcellin Berthelot, tradukis Marcel Finot, por *Tra la Mondo*.

La scienco montras al ni ke, en ĉiuj fakoj, la profitoj de la homoj estas solidaraj, tiel en fako de la vivo privata kaj de la saneco individua, kiel en fako de la vivo ara.

La sperto de la historio pruvas, ke tio estis ĉiam tia, por malsamideeco de la popoloj, tiel, kiel de la individuoj. La batalado kaj la imperialismo kaŭzis, ordinare, la ruinigon de tiuj, kiuj per ili elserĉis sian riĉecon. Ĉiu domaĝo kaŭzita al ia popolo aŭ individuo estas pereco por ĉiuj; pereco materia, detruo senfrukta de parto de la valoraĵoj al ili rabitaj; pereco morala, ankoraŭ pli grava, per malfortigado de ligiloj naturaj kiuj ligas la homojn unu al la alia.

Tiu ĉi solidareco estas do ne pura abstrakto; mi aldonos ke ĝi estas la esteco mem de la scienco nuntempa, tial ke ĝi prezidas al ĝia vastigo. Ĉiu verko scienca estas verko opa; nenia eltrovo estas izola; sed kia ajn estu la genio de la eltrovisto, tiel en teorio, kiel en praktiko, lia verko eluzas necese tiel la aron de eltrovoj antaŭaj de serĉistoj, kiuj antaŭ li laboris, kiel la penadoj pli malpli feliĉaj de liaj samtempoj. La scienco estas, ni tion rediras, opa verko, naskiĝinta el sindoneco profesia de scienculoj al vereco pura aŭ praktika. Ĝi elnecesigas, por tiu, kiu ĝin serĉas, samtempe la respekton de la vereco kaj la senton de la afero, kiu el ĝi estas nedisigebla. Tial do la verko de la scienco estas precipe verko de paco, fondita por profito kaj feliĉo de ĉiuj. Ĝi devas apogi sin sur akcepto reciproka de sciantoj kaj lernantoj kaj sur simpatio frata de ĉiuj; simpatio tiom pli bone pravigita, ke ni kolektas hodiaŭ la frukton de la laboroj de nia antaŭularo, kaj ni devas transdoni tiun heredon pligrandigitan al nia posteularo.

Tiuj ĉi veraĵoj propagandiĝas, hodiaŭ, inter la pensistoj kaj la nacioj; ili celas enkonduki aliformigon ĝeneralan de la ŝtatoj, sufiĉe rapide por antaŭsciigi la vastajn internajn kaj internaciajn konfliktojn, kiuj minacas la nuntempajn popolojn. Ĝis nune, per intermeto de la perforto okazis la plej grandaj sociaj ŝanĝoj. Tamen estas certa, ke la popoloj kaj la regnestroj suferas la influon pligrandigantan de la konvinkoj truditaj de la scienco kaj kiuj fine determinas la volojn pripensitajn de la plej granda parto de la homoj civilizitaj.

Per tiu espero, ni propagandu ĉie la edukadon sciencon,

en ĝiaj formoj materiaj kaj moralaj la plej kompreneblaj: eble ni sukcesos foririgi tiujn batalojn kaj tiujn malfeliĉaĵojn, kaj alkonduku fine la tempojn benotajn de la egaleco kaj de la frateco de ĉiuj homoj, solidarigitaj de la sankta leĝo de la laboro! Tia estas la idealo, kiun la moderna scienco instruas al la homa raso!

LA HIPOKRITECO DE "LA HAGO"

El grava amerika organo revolucia, *Appeal to Reason*.

Unu ĵurnala korespondanto, skribante ĉe La Hago (angle, *The Hague*), kie nun sidadas la tiel nomata Internacia Konferenco Por la Paco, diras: "La hipokriteco de La Hago devas plene sin montri al iu studento de la internacia politiko kiu rigardas sub la supraĵon de aferoj."

Li direktas atenton al la fakto, ekzemple, ke la germana imperiestro kontraŭstaras la senarmiĝon tiom "pro la socialistoj" kiom pro la ĉirkaŭaj nacioj kies regantoj estas tiel multe kiel li mem avidaj je teritorio. Li malkaŝe citas la diron ke "la internacia leĝo estas nur bruta povo," kaj plue diras ke *estas necble eviti estontajn militojn escepte ke la nacioj sin interligu por subpremi revoluciojn en tuta la mondo!*

Estas tre videble al iu observanto kiu rigardas "sub la supraĵon de aferoj," ke la programo de la militaj sinjoroj estos, anstataŭ pretermeti siajn armilojn, unuigi siajn aferojn kaj uzadi sian tutan armilaron por subpremi al la *kapitalista povo post ĉinĵ la tronoj* la laboran klason.

Ĉia ĉi tia brua parolaĉo^a pri senarmiĝo estas nur por plaĉi al nelertaj sentimentaluloj kaj trompi la subprematojn al tiu sama espero kiu dum centjaroj estas ame prizorgitaj, kun nenia rezultato krom malespero de la animo kaj la kreskanta konvinko ke nenian fidon oni povas teni al reĝoj, aŭ al la kapitalistaj efektivaj regantoj de nacioj.

Ne grave kiel multe la nomaj regantoj de Eŭropo indidue deziras pacon, ili havas nek la emon nek la povon fari paŝon en tiu direkton pro la simpla kaŭzo ke kiom ajn da povo ili posedas devenas de la monsinjoroj kaj bienuloj, kaj la posedantoj devas fidi al armeoj por defendi la riĉaĵon de si posedatan.

^aLa sufikso aĉ estas multe uzata. Ĝi signifas malestimon. Vidu p. 69, "The American Esperanto Book."

ESPERANTO, VERKO DE ARTO

Verkis Ano de American Esperanto Society, No. 49.

Multe pri arto mi ne scias. Tamen, antaŭ kelkaj tagoj mi aŭdis paroladon en kiu oni proponis kvar provilojn por diri ĉu literatura verko aŭ pentraĵo aŭ muzikaĵo estas laŭ-arta. Ili estis unueco, simpleco, reservo kaj proponemeco. Estas do pretendate ke Esperanto estas verko de arto laŭ tiuj signoj.

Ĝia unueco estas montrata per la principo ke oni elektis kaj elektadas nur la plej bonan. La aŭtoro de nia lingvo elektis la plej facile elparoleblajn sonojn kaj la plej komunajn literojn por ilin reprezenti. Sammaniere la plej bonaj vortoj, fleksoj kaj sintaksreguloj estas venintaj el siaj propraj lokoj por loĝi en la esperanta templo. Kion ajn ĝi mankas, tio ne estas unueco.

De simpleco la pruvo estas facileco por lerni kaj uzadi. Nur unu ekzemplo sufiĉos. La skribanto studis la germanan lingvon du jarojn kun la plej interesigema lernigisto po du horoj ĉiutage; ankaŭ li estas studinta Esperanton po duonhoro ĉiutage. Ĉu iu suspektas, ke li povas skribi korektan germanaĵon? Mi esperas ke ne!

Kiam oni konas nur suflĉe da la Zamenhof'a lingvo por esprimi siajn pensojn, li neege konas la tutan lingvon. La literaturo jam verkita, kaj la aŭ de alilanduloj aŭ de la studento mem verkota povas esti nomata "reservaĵo." La vortoj de sperta esperantisto havas kovritan fortikon; ili ne diras ĉion, kio estas pensita. Fluantaj akvoj montras rezervon, el kiu pli multaj akvoj povas fluadi plu kaj plu.

Kvare, ĝi vokas fore de la lernado de la "a, bo, co," kaj simplaj gramatikaj afiksoj al legado de tradukaĵoj, kaj paŝo post paŝo ĝis fine oni venas al perloj kaj trezoregoj de kongresa elokventeco kaj unu tutmonda antologio.

Oni studas verkon de arto por ke li aniĝu la artamantaron aŭ ke li faru verkon similan je tiu antaŭ li, aŭ nur pro la plezuro mem. Unuamane multaj bone povus studi Esperanton. Se oni konsideros, kioma la tutmonda Societo iĝos, kiajn utilojn esti membriĝinta povas venigi al si la korespondanto aŭ vojaĝanto, kiajn bonvolaĵojn li ricevos de fremduloj, k. t. p., oni ekvidos ke estas grandaĵo esti ano de ĉi tia universala aro de instruitaj gesinjoroj.

Ree, oni povas studi Esperanton videble ne por krei

alian internacian komunikilon, sed por ke li povu fari per ĝi verkojn similajn je la modeloj kiujn li tiel multe admiras.

Sed se oni studas Esperanton nur por la ĝojo, kiun li ne malsukcesos ene trovi, ĉu tio ne estas sufiĉa kaŭzo, kiel por la studo de granda verko de literaturo, greka, latina, germana, aŭ granda pentraĵo de Miĥaelo Anĝelo, aŭ unu el la pli malfruaj majstroj?

Mi opinias, ke jes!

HIMNO DE SARA

El "Faraono," romano de Prus. Tradukis Kabe por *La Revuo*.

Kiel granda estas la Sinjoro, kiel granda estas la Sinjoro, via Dio, ho Izraelo!

Liaj tagoj ne havas komencon kaj Lia domo ne havas limojn. Sub Lia rigardo la eternaj ĉieloj aliĝas kiel vestoj, kiujn la homo surmetas kaj forĵetas. La steloj ekbrulas kaj estingiĝas, kiel la fajreroj el malmola ligno, kaj la tero estas kiel briko, kiun la pasanto unu fojon tuŝis per la piedo, irante ĉiam antaŭen.

Kiel granda estas via Dio, ho Izraelo! Ne ekzistas tiu, kiu dirus al Li: "Faru ĉi tion!" nek semo, kiu Lin naskis. Li faris la senlimajn profundegaĵojn, super kiuj Li flugas, kien Li volas. Li el la mallumo eligas la lumon kaj el la tera polvo la kreaĵojn havantajn voĉojn.

Por Li la kruelaj leonoj estas kiel akridoj, la grandega elefanto estas nenio, kaj la baleno estas apud Li kiel suĉinfano.

Lia trikolora arko dividas la ĉielon en du partojn kaj sin apogas sur la ekstretoj de l' tero. Kie estas la pordego, kiu egalas Lian grandecon? Ĉe la tondro de Lia veturilo la popoloj falas de teruro, kaj ne ekzistas estaĵo sub la ĉielo, kiu povas kontraŭstari Liajn brilantajn sagojn.

Lia spiro estas la norda vento, kiu refreŝigas la svenintajn arbojn kaj lia blovo estas la ĥamsino, kiu bruligas la teron.

Kiam Li etendas la manon super la akvoj, la akvo ŝtoniĝas. Li transversas la maron en novan lokon, kiel la virino la acidon en la vazon. Li disŝiras la teron, kvazaŭ putrintan tolon, kaj la nudajn suprojn de la montojn kovras per la arĝenta neĝo.

Li en la tritika grajno kaŝas cent aliajn kaj vekas la birdojn en la ovojn. Li el dormema krizalido eligas la oran

papilion, kaj al la homaj korpoj ordonas atendi en la tomboj la reviviĝon.

Li vidas la movojn de la koro de la raŭpo, kaj la kaŝitajn vojetojn, sur kiuj iras la plej izolita homa penso. Sed ne ekzistas tiu, kiu al Li povus rigardi en la koron kaj diveni Liajn intencojn.

Antaŭ la brilo de Liaj vestoj la grandaj spiritoj kovras siajn vizaĝojn. Antaŭ Lia rigardo la dioj de l' potencaj urboj kaj popoloj tordiĝas kaj sekiĝas kiel velkinta folio.

Li estas la forto, Li estas la vivo, Li estas la saĝo, Li via Sinjoro, via Dio, ho Izraelo!

LA BLINDA KNABO KAJ LA ĈIELO

El "Chinese Nights' Entertainments," de Adele M. Fielde, esperantigis Lewis B. Luders, Prezidanto de la Esperantista Societo de Filadelfio.

Estis iam knabo, kiu estis blinda tuj de sia naskiĝo. Li loĝis kun viro kiu estis ankaŭ blinda, sed nur de kelkaj jaroj. Ofte la knabo demandis de la viro pri la vidiĝo de la ĉirkaŭaj objektoj, ĉar la viro, estinte vidpova, sed nun estante blinda, povis pli bone ol iu alia klarigi al li pri tiaj aferoj. La knabo interesiĝas pri la ĉielo, kaj demandis al kio ĝi similas.

"Ĝi estas blua, simile al indigo," respondis la viro.

La knabo palpis indigon, kaj sentis, ke ĝi estas polvereca. "Ha," diris li, "la ĉielo estas polvereca!"

Post nelonge, li ree demandis pri la ĉielo.

"Ĝi estas blua, simile al via plej bona vestaĵo, kaj sur ĝi staras la suno," respondis la viro.

"Kaj al kio similas la suno?"

"Ĝi estas brila, simile al granda pelvo de flava kupro," estis la respondo.

La knabo palpis sian plej bonan vestaĵon. Ĉar li ne ofte portis ĝin, ĝi estis iom ŝiminta. "Fi, la ĉielo estas ŝiminta!" li pensis. Li ankaŭ palpis flavkupron, kaj diris al si mem: "Ha, la suno estas glata, kaj tintadas kiam oni palpas ĝin."

La sekvantan tagon, li marŝis tra la strato, kaj faletis kontraŭ pelvon, plenan je ŝiminta faruno, kiun virino estis elmetinta por aerumi. Li kaj la pelvo falis kune sur la teron.

"Helpu! Helpu min!" li kriegas, "mi falis en la ĉielon!"

“HO AMU, DUM VI AMI POVAS”

El germana originalo de Freiligrath tradukis Otto Haux Mayer, Chicago

*Ho amu, dum vi ami povas!
Ho amu, antaŭ ol malfruos!
Ĉar venos horo, venos horo,
Ĉe tombo kiam vi genuos!*

*Kaj zorgu ja, ke ame ardu
Kaj floru ame koro via,
Dum varme kontraŭ ĝi ankoraŭ
En amo batas kor' alia!*

*Kaj ne maldolĉon elparolu!
La lang' ĝin senpripense diras.
Ho Di', vi ne ofendi volis!
Sed plende la aŭdint' eliras!*

*En alta tomba herb' vi tiam
L' okulojn larmoplenajn kaŝos,
Jam ne l' amaton ekvidontajn,
Kiom ajn tien vi repaŝos.*

*Li jam ne vidas vin nek aŭdas,
Por ke vi nun lin ĉirkaŭprenu;
Jam ne kun kis' la lipo diras:
Mi vin pardonis, ne ĉagrenu!*

*Ho amu, dum vi ami povas!
Ho amu, antaŭ ol malfruos!
Ĉar venos horo, venos horo,
Ĉe tombo kiam vi genuos!*

EL LA PRESEJARO ESPERANTISTA

Sro. Badin.—Unuakta komedieto postulanta tri personojn: 25 centimoj. *E. Arrault kaj Ko., Tours, Francujo.*

Kelkaj Floroj Esperantaj.—Seriaj eldonoj de ilustritaj humoraĵoj esperantaj. Jam aperis N^o 1^a, 2^a kaj 3^a. Ili estas tre interesaj kaj tute valoras la prezon: ĉiu numero, afrankite, 25 centimoj. *A. J. Witteryck, Nouvelle Promenade 4, Bruges, Belgujo.*

Morituri Vos Salutant (*Mortantoj Salutas Vin*).—Jen estas verketo el la armena lingvo, tradukita de nia propagandema amiko, Georgo Davidov. Ĝi estas altirema rakonto pri unu el tiuj teruraj interrasaj kaj interreligiaj hombuĉadoj kiuj tiel ofte okazas en Armenujo.

Companion of the English Esperantist.—Veŝtpoŝa libreto enhavanta elementojn de Esperanto, frazojn ordinarajn en angla kaj esperanta lingvoj, paĝojn por memornotoj, k. t. p.; forte bindita per verda tolo. Afrankite, 60 centimoj. Verkita kaj eldonita de *A. J. Witteryck, Nouvelle Promenade 4, Bruges, Belgujo.*

Worterbuch Esperanto-Deutsch.—La titolo montras plene la enhavon; 248 paĝoj. En antaŭparolo, Dro. Zamenhof aprobas la vortojn enhavatajn de tiu ĉi libro, kiu kompreneble enhavas pli multe ol estas en la Universala Vortaro. Kun papera kovrilo, 2 markoj; tole bindita, Mk. 2.50. *Esperanto Verlag Moller & Borel, Prinzenstrasse 95, Berlin.*

Pitman's Phonography Adapted to Esperanto.—Tiun ĉi tre interesan verkon aranĝis Sro. George Ledger, de la Brita Asocio. Kompreneble la sistemeco de la lingvo Esperanto igas ĝin facile skribebla per la fonografaj signoj. La verkon cititan oni bone presis kaj taŭge bindis. Prezo, 25 cendoj. *Isaac Pitman & Sons, 31 Union Square, New York.*

Blinda Rozo.—El la flandra lingvo de Hendrik Conscience, esperantigita de Sino. Edm. Van Melckebeke-Van Hove, kaj presita post la morto de la tradukinto. Kor-tuŝema fabelo, bone esperantigita. Ilustrita; 50 paĝoj. Kvankam broŝure bindita, tiu ĉi eldonaĵo ankaŭ meritas laŭdon pri la bona kvalito de papero kaj arta stilo de laboro. Afrankite, 1 franko. *A. J. Witteryck, Nouvelle Promenade 4, Bruges, Belgujo.*

Kuracisto per Batoj.—Unuakta komedio el la hispana de Leandro Fernandez Moratin, tradukita esperanten de Vincente Inglada. Tre humora teatraĵo, postulanta ok personojn. En maniero originala ĝi rakontas pri la mal-

facilaĵoj de l' amo, kaj ĉe la fino ĉiuj estas tre feliĉaj. Viro kiu estas, vole nevole, perforte igita kuracisto, bone rekom-pencas al siaj instruantoj, kaj en ĉiu akto estas la sento de "kio sekvos?" tenanta la atenton de la komenco ĝis la fino. Prezo, duonpeseto. Eldonita de *Tipografia Moderna, Avellanas, 11, Valencia, Hispanujo.*

Franca Gramatiko por Esperantistoj.—Tiu ĉi grava verko de Paul Boulet, kun antaŭparolo de Sro. Boirac, prezidanto de Lingva Komitato, celas konstati la plenan neŭtralecon de Esperanto, montrante ke nefranca esperantisto pli multe ŝatas kaj pli facile lernas la francan lingvon ol neesperantista fremdulo. Ĉar la celo de Esperanto estas forigi la bezonon de la franca por anglo, oni dubas ke la libro multe uziĝos. Sed ne ekzistas dubo, ke anglo jam komprenante Esperanton estas lian francan lecionon duone lerninta. Prezo de la libro priparolita, Fr. 1.50. Oni ĝin mendu ĉe la aŭtoro, *Sro. Paul Boulet, 80, Boulevard du Prince-Albert, Boulogne-sur-Mer, France.*

Tra Mez-Afriko.—En la kunveno ĉe Genevo, Komandanto Lemaire, el la belga armeo, faris tre interesan paroladon pri liaj esploradoj en la "malluma kontinento," ilustritan per fotografaĵoj prezentitaj per lumprojektilo. La Komandanto estis dum kelkaj jaroj en Meza Afriko kiel estro de ekspedicio scienca, kaj kvankam li konfesis ke li unue parolis publike per Esperanto ĉe Genevo, lia parolado multe interesis ĉiujn aŭskultantojn. Tiu ĉi parolado estas eldonita en formato de granda broŝuro. Kiel oni ne povas diri pri ĉiuj eldonaĵoj de eŭropaj presejoj, ĝi estas belege presita, sur taŭga papero, kaj bone bindita. Venu la tago kiam ĉiuj esperantaj libroj estos tiel bone faritaj! Ĝi havas multajn ilustraĵojn kaj tekstojn francan kaj esperantan sur kontraŭaj paĝoj. Prezo, 3 frankoj. Eldonisto, *A. J. Witteryck, Nouvelle Promenade 4, Bruges, Belgujo.*

Vocabulaire Francais-Esperanto Technologique.—Tiu ĉi libro, la alia parto de kies iom mallonga titolo estas *des Termes les plus Employes en Photographie*, estas tre multvalora verko por Esperanto kaj la fotografarto. Plue, ĝi estas ekzemplo inda je imito kiel eble plej frue de aliaj artoj kaj industrioj, ĉar kio helpus al nia afero pli multe ol la teknikaj vortaroj? La priparolitan vortaron verkis Sro. Ch. Verax. Jen ree oni devas protesti kontraŭ maltaŭgan bindaĵon! Je la nomoj de la tuta aro de gedioj kaj fiŝetoj, ĉu ne povas esperanta *vortaro* almenaŭ ricevi kovrilon kiu restus fidela al la enhavo dum kelkaj minutoj? Jupitero! kial ne sendu korbeton en kiu oni tenus la pecojn? Kaj tiaokaze, postulu pli altan prezon ol Fr. .75, prezo de la libro citita, kaj kiu devas posedi ĉiu fotografisto. Oni ĝin mendu ĉe la eldonanto de nia bona kunfrato, *Internacia Foto-Revo, Sro. Charles Mendel, 118 et 118 bis, rue d'Assas, Paris.*

Elements of Esperanto Nova pamfleto 16-paĝa, presata per *long primer* literoj sur bona papero. Kiel signifas la nomo, ĝi montras la elementojn de nia lingvo, lecionetojn, kun la ĉarma Zamenhof'a rakonteto, "La Feino," kun plena angla traduko. Tiun ĉi *bonegan propagandilon* ni vendas unuoble por 5 cendoj. Ni dissemas ĝin *senpage* nur jene: Sendu adresojn de viaj konatuloj, enfermante unucendan poŝtmarkon por ĉiu adreso, kaj ni poŝtigos al ĉiu unu ekzempleron, ĉu vi sendas dek aŭ dek mil adresojn. *Ne* skribu: "Sendu min centon—aŭ, se konvenas, tri milionojn—da propagandiloj kaj mi ilin disdonos, kompreneble al via profito." Ni havas planon, laŭ kiu, se vi kredas al la ebla profito, ni ĝin dividuos kun vi laŭkontrakte. Pri tio, nin skribu. Ne hontu akcepti gajnon el via laboro por Esperanto, ĉar tio ebligas pli fortan propagandadon. Se vi kunlaboros, ni portos la plimulton da risko, permesante al vi la plimulton da profito.

A new 16-page pamphlet, printed in long primer type, on good paper. As the name indicates, it shows the elements of our language, some little lessons, with the charming Zamenhof storiette, "The Fairy," and complete English translation. This excellent propaganda *ilo* we sell singly at 5 cents. We distribute it *free* in the following manner only: Send addresses of your acquaintances, enclosing a one-cent stamp for each address, and we will send each one a copy, whether you send ten or ten thousand addresses. *Do not* write: "Send me a hundred—or, if convenient, three million—propaganda booklets and I will distribute them, of course to your profit." We have a plan whereby, if you have faith in the possible profit, we will divide it with you by contract. Don't be ashamed to take winnings from Esperanto, for that makes possible a stronger propaganda. If you will cooperate, we will carry most of the risk and allow you most of the profit. Write to us about it.

Poŝtakarto Surhavas la tutan gramatikon de Esperanto. Bonega rimedo konigi viajn amikojn je Esperanto. Unu, 2 cendoj; dek, 10 cendoj; cente, 50 cendoj.

The entire grammar of a language on a postal card! An excellent means of acquainting your friends with Esperanto. One, 2c; ten, 10c; one hundred, 50c.

A Press Committee, Consisting of one member for each state, province and territory in North America, can accomplish wonders for Esperanto. Are *you* willing to help the cause in your own section? Please say so, on a postal card.

Pri ĉio adresu:

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO

1239 Michigan Boulevard, Chicago

FAKO DE KORESPONDADO

- J. F. HORNE, 1004 N. 16th St., Clarinda, Ia., U.S.A.
 C. H. RUSH, 1066 15th St., San Francisco, U. S. A.
 JAMES MUIR, Circle City, Alaska
 J. M. RECTOR, Monarch, Montana, U. S. A.
 J. CLIFF ANDERSON, Terre Haute, Ind., U. S. A.
 MICHEL AMBROS, Ekateringofskij Pros., d. 12. kv. 31
 Peterburgo, Ruslando.
 J. ROUGE, 31, rue Ste. Genevieve, Lyons, France.
 GJORGI BAKRADZE, Tsarkaja 61, Vladikaŭkazo,
 Kaŭkazo, Ruslando.